



Kulturaj Kajeroj

E.M.A.M.C. →

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1991 — 3


(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi legos pri...



... Lemurio ...



*Runa ŝtono proksime de Mariefred
(provinco Sudermanland)*

... Kaj la « runoj »

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo(Frangeul)	2
Lemurio (E. Motillon)	3-5
La Runoj (J. Lundgren)	6-7
Kunkuŝe kun reĝinoj (S. Boniol)	8-9
La kontraŭpeŝta muro	10
La mireginda tekruĉo (tr.Gambier)	11-12
Reykjavik antaŭ unu jarcento	13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

Kvankam la somero anonciĝis nur mezbona, lastminutaj aliĝoj preskaŭ plenigis la kastelon ek de la 15-a de julio ĝis la fino de aŭgusto. Provizora financa raporto estos prezentata okaze de la oktobra kunveno de la komitato.

Ŝajnas, ke la kulturaj aranĝoj same sukcesis, kiel kutime. La prelegoj de M. Boulton, B. Cheverry, F. Boyet, P. Metivier, F. Roose multe interesis la ĉeestantojn. G. Lagrange ne nur prelegis sed ankaŭ gvidis plensukcese kurson pri la "arto traduki". La kursoj de M.J. Berger, E. Bondar, F. Boyet, P. Grzybowski, M.T. Lloancy, T. Lustokowa, E. Perevertajlo, C. Vennin kaj J. Vincent alportis al la aliĝintoj la unuajn elementojn de la lingvo kaj la praktikadon diversnivele de Esperanto en internacia etoso: vizitis Gresillon geesperantistoj el 16 diversaj landoj.

La okazoj lerni kaj praktiki

la lingvon estas multaj en tia loko, kia la Esperanto-Domo Gresillon. Se ne ĉiuj plene profitas de tiuj eblecoj ili mem kulpas. Ĉar dum la tuta tago, en la parko, ĉe la manĝo-tablo, en la salonoj oni povas paroli nur en esperanto. Bedaŭrinde oni foje aŭdas ankaŭ naciajn lingvon. La ĉefa kaŭzo estas grup-fenomeno: kiam pluraj samlingvanoj troviĝas en la sama loko, ili emas ariĝi kaj, ĉar konversacii ŝajnas al ili pli facile kaj nature en la nacia lingvo, tion ili faras. Ĉar pli multaj estas la Francoj oni aŭdas la francan lingvon. Sed kelkfoje ankaŭ la germanan, la nederlandan, la anglan aŭ la hispanan. Estus sense postuli la nuran uzadon de esperanto, ĉar okazas ankaŭ, ke esperantistoj el alia lando ol Francio ŝatas ekzerciĝi en la franca lingvo, aŭ, ke Francoj profitas de la okazo por ekzerciĝi en la germana, la angla, la hispana...

Sed estas plensence diri al ĉiuj: Geamikoj laboras dum la tuta jaro por krei plej bonajn kondiĉojn, por ke vi lernu la lingvon kaj per la lingvo. Estu afablaj. Ne preteratentu tiun laboron.

Esperanto tra la Mondo



JUNULARA KONGRESO 92 EN MONTREAL-

La 48-a Internacia Junulara Kongreso okazos de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1992 en Montreal, samtempe kun diversaj eventoj okazigotaj pro la 350-a datreveno de la urbo. Adreso de la Loka Kongresa Komitato: 6358-A, rue de Bordeaux, Montreal, Quebec, Kanado H2G 2R8.

RUSA SESIO DE AIS-SAN MARINO

"LINGVO-KULTURO-EKOLOGIO"-

Tiu sesio okazos parte en Moskvo, parte en Leningrado, inter la 29-a de decembro kaj la 8-a de januaro 1992. Adreso de la organiza komitato: Geografia soc.USSR "Russkaja sessije", ul. 25 Oktabrja 8/1, SU-103012 Moskva.

DUA AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO-

En Benino, de la 27-a de decembro 1991 ĝis la 2-a de januaro 1992. Adreso: UEA, Afrika agado, p/a H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

5-a PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Tiu kongreso okazos en Qingdao, Ĉinio, de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1992. Adreso de la organiza komitato: 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, Hotelo Huanghai, 75 Yan-an Yi Lu, CN-266003 Qingdao. Perantoj en pluraj landoj. Por Francio: Raymonde Perault, p/a UFE 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

INTERNACIA ESPERANTO-FESTIVALO-

En Parizo denove okazos, de la 9-a ĝis la 11-a de novembro 1991, kun i.a. la teatra trupo "Kia koincido" el Germanio, kiu prezentos "La pupodomo" de H. Ibsen kaj teatra trupo el Bulgario; recitalo de Jak Le Puil, muziko per malnovaj tradiciaj instrumentoj... Informoj kaj aliĝoj: D. Doye, 169, avenue de Choisy, 75013 Paris. Eblos rezervigi hotelĉambron je modesta prezo. Okazos gvidata vizito de Parizo.

SUPERA LERNEJO DE ORIENTA KULTURO-

Prof. Liang Ziming (Ĉinio), prezidanto de prepara komisiono de la internacia organizaĵo por altlernejaj esperanto-instruantoj, planis fondi internacitipan "Superlernejon de Orienta Kulturo" en Pollando, por akceli la kunigon inter esperanto kaj supera edukado kaj pluan interfluan kadre de kulturoj, sciencoj, teknikoj inter Pollando kaj aziaj landoj. La pola ministro pri Edukado, prof. D-ro Roman Duda jam renkontiĝis kun prof. Liang Ziming.

UMEA-CENTRO DE JAPANA MEDICINO-

Centro pri orienta medicino UMEA Shinoda-Kuracejo estas malfermita en Krakovo (Pollando). D-ro Shinoda estis la nun forpasinta honora prezidanto de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). En tiu centro oni ankaŭ organizos internaciajn kursojn pri orientaj kuracmetodoj, kompreneble en esperanto.

KIEL ENKONDUKI ESPERANTON EN LA LINGVA POLITIKO EN EUROPO?- La koncernataj esperantistoj, tute speciale la edukistoj, estas petataj legi la gravan artikolon de la UEA-estrarano Gregoire Maertens en "Esperanto" de julio-aŭgusto pri la studota agado por enkonduki esperanton en la oficialan lingvan politikon de la eŭropaj instancoj. Eventuale, rilati kun S-ro G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

47-a SAT-AMIKARA KONGRESO- Ĝi okazos en Bordeaux de la 17-a ĝis la 21-a de Aprilo 1992. La temo elektita estas originala kaj interesa: "De Mozart ĝis Eŭroka, muziko kaj Esperanto: komplaceco de du internaciaj lingvoj". Informoj pri la kongreso donas: Simonne Bernard, 171, rue Raymond Poincaré, 33110 Le Bouscat. Zorgas pri la programo: Marcel Redoulez 33750 Camarsac. Tel. 56.30.16.59.

LEMURIO

AŬ KONTINENTO DE MU

Antaŭ malpli ol cent jaroj, en Eŭropo, famaj kleruloj, membroj de Akademioj kaj sciencaj asocioj, asertis, ke la homaro estas proksimume okmil-jara. Tiu opinio estis bazita sur tiama ĝenerala kompreno de la Biblia genealogio. Neeble estas en tiu artikolo montri la sinsekvajn etapojn antaŭintajn la nunan scion. Modernaj verkistoj dediĉis tutajn librojn je tiu studo. Mi nur provos skizi mallongan historion de nia Tero, laŭ la nerefuteblaj pruvoj amasiĝintaj dum pli ol du jarcentoj. Historio, kies diskonigo estis malhelpita de la rutino de iuj, antaŭjuĝoj kaj eĉ malsincereco de aliaj; ankaŭ pro vera "konspiro de silento", kaj persekutoj kontraŭ la kuraĝuloj, kiuj maltime proklamis veraĵojn. Bedaŭrinde, tiu negativa mensostato ankoraŭ ne estas tute malaperinta!

La granda kosma kataklismo nomita "Universala Diluvo" okazis inter 10 aŭ 12 miljaroj antaŭ la nuntempo. Ĝi estis ne nur inundego, sed ĝin akompanis potencaj vulkanaj erupcioj, gigantaj tertremoj kaj granda sism-ondego, kiu kvazaŭ forbalaisla teran surfacon. Pruviĝis, ke de sia naskiĝo, nia planedo suferis multajn modifiĝojn kaj gravajn kataklismojn. La drivado de la kontinentoj, la sismaj skuegoj, la vulkanaj erupcioj ŝanĝis, kaj ankoraŭ ŝanĝas, ĝian surfacon, kaj ofte ankaŭ la biologiajn kondiĉojn.

La primitiva civilizo estis kompreneble antaŭita de malfacila popolizado meze de malkonfortaj vivkondiĉoj. Ne eblas apreci la daŭron de tiu unua periodo de la vivo de homaro, eble milojn da jarcentoj. Sed nun ekstaras la unua problemo. Pro la diverseco de la homaj rasoj, estiĝas tiu alternativo: ĉu la homaro elvenis el unu sola grupo, aŭ el unu sola

paro, laŭ la religia hipotezo; ĉu en la sama epoko kaj samtempe, aperis homaj grupetoj aŭ kernoj sur la tero en malproksimaj lokoj, sen iaj interkontaktoj, evoluintaj dum jarcentoj antaŭ ol reciproka konatiĝo? Laŭ dokumentoj de ni posedataj, la unua hipotezo aperas valida. La similaĵoj trovitaj inter ĉiuj civilizoj malaperintaj kaj la nun ekzistantaj montras komunan originon por ĉiuj homoj. Antropologio eksplikas la rasajn diferencojn per la influo de la vivmedio, la ĉirkaŭaĵo, la nutriĝo, la kutimoj kaj moroj, ktp.

Ni povas aserti, ke la unuaj homoj naskiĝis sur tiu vasta primitiva kontinento nomita "Mu" de siaj loĝantoj, kiun la sciencistoj nomis "Lemurio". La deveno de tiu nomo estas sufiĉe kurioza, kaj estas citinda.

En Madagaskaro, Pacifikaj insuloj kaj kelkaj partoj de Afriko kaj Azio, ekzistas stranga raso de animaloj konsistigantaj la klason de "Lemuroj". Tiu nomo, signifanta "mallumo" estis donita al ili el latina radiko, ĉar ili ĉiuj estas noktaj bestoj, dormantaj dum la tago. Tiu klaso de Lemuroj aŭ "prasimioj" konsistas el malgrandaj animaloj similantaj simiojn, havantaj kvar manojn kun tre bele formitaj fingroj. Ilia vizaĝo aspektas preskaŭ homa kun larĝaj rondaj okuloj. Diversaj specioj estas konataj laŭ la nomoj: lemuroj, makioj, tarsioj, hierogaloj, lepi-lemuroj, ktp. La eltrovo de prahistoriaj, grandaliaj skeletoj de lemuroj, precipe en Madagaskaro, kredigis, ke ilia originejo estis la malaperinta kontinento. Tial tiu kontinento estis nomita "Lemurio". Dum la lasta jarcento oni eĉ hipotezis, ke la homo estas ido de tiuj lemuroj. Tiu opinio ne plu estas akceptata de iu ajn klerulo.

La vasta kontinento "Lemurio", kiu etendiĝis de la Japana maro ĝis la nuna Ameriko, jam parte enprofundiĝis je epoko, kiun oni

kalkulas proksimume antaŭ 50 000 jaroj. Tio estigis la leviĝon de Himalajo, de la Tibeta montaro, de aliaj aziaj montoj kaj, eble, de la eŭropaj montaroj. Proksimume antaŭ 38 000 jaroj, okazis la kataklismo, kiu submergis la reston de la kontinento kaj levigis la amerikajn montarojn, Andojn, Kordelierojn, Rokan Montaron, k.a. ankaŭ Atlantidon. Kelkaj ella eskapintoj de la unua kataklismo rifuĝis en Amerikon. La plej granda parto el la saviĝintoj de la dua katastrofo rifuĝis en Atlantidon. Tie, ili evoluigis la plej brilant civilizon iam ekzistantan en la mondo.


Kion ni scias pri tiuj Lemurianoj aŭ Muanoj? Evidentas, ke dum 200000 jaroj ili havis sufiĉan tempon por evoluigi superan civilizon. Laŭ multaj dokumentoj, gravuritaj ŝtonoj, skribaĵoj sur bestaj feloj, ĉiaspecaj restaĵoj, ankaŭ antikvaj manuskriptoj konservitaj de Ĉinaj, Tibetaj, Hindaj anoj de la esotera societo Rozo-Kruco, oni povas proksimume bildigi la ĉefajn trajtojn de la Lemuria civilizo je ĝia kulmino.

Tiuj homoj, niaj unuaj prapatroj, estis ĝenerale grandaj. La meza staturo estis proksima je 1 metro kaj 80 centimetroj; ĝi atingis eĉ du metrojn. Vivo en la libera aero en tropika kaj sunumita klimato igis la koloron de ilia haŭto bronza aŭ kupra. La virinoj, ĝenerale

malpli altkreskaj kutimis protekti sian vizaĝon per maldensa vualo kaj estis renomaj pro la heleco de sia haŭto. La kap-haroj, ĝenerale nigraj, estis tonditaj mallongaj sur la antaŭa parto de la kapo. Malantaŭe ili estis longaj kaj flirtis sur la ŝultroj aŭ estis aranĝitaj laŭ plektaĵoj. La vestaĵoj, malmulte ornamitaj, estis larĝaj kaj malstrikte alligitaj al la korpo. La domoj, konstruitaj el ŝtono, estis maldense grupigitaj ĉirkaŭ la temploj kaj publikaj konstruaĵoj. La laborejoj kaj fabrikoj estis izolitaj de la loĝejoj.

La vivodaŭro estis ofte pli longa ol unu jarcento, kaj eĉ daŭris ĝis 120 aŭ 130 jaroj. La tre aĝa Lemuriano sciis kiam lia morto aŭ "transiro" estis proksima. Kiam ĝi estis okazonta li uzis siajn lastajn vivotagojn por definitive akuratiĝi siajn terecajn aferojn, por ke neniu ricevu malutilon pro lia forpaso. Ne ekzistis heredaj problemoj. Heredaĵo konsistis nur el kelkaj objektoj aŭ simbolaj juveloj, sen ia ajn valoro krom memoriga. La Lemurianoj konsideris, ke ĉiuj materiaj aĵoj neniam havas propran valoron; tial ili ne amasigis tion kion ni nomas riĉaĵoj.

La mortonto mem fosis sian tombon, helpate de parencoj aŭ amikoj. Kiam la lasta tago estis alveninta, li eniris en la fositaĵon, ekmeditis



Hinda mito de l' Diluvo

kaj la animo forlasis lian fizikan korpon en kvieteco kaj paco.

Morto estis nek dezirata nek timata. Ĝi estis rigardata, kiel etapo en la vivo de la animo, transiro al nova ekzistomaniero. Reinkarniĝo estis konsiderata, kiel justigita kaj demonstrita vero. La religio konsistis el studado de la universalaj kosmaj leĝoj. Oni reprezentis la kreantan Dion, ununuran, universalan, kaj ĉie-estantan, per la simbolo de la suno, estiganto de ĉia vivo sur nia planedo. Oni nomis lin RA aŭ RE. La Lemurianoj asertis, ke la universala energio agas per kvar grandaj primaraj fortoj. Ili reprezentis ilin per diversaj simboloj, aŭ grafismoj, kiuj postdaŭras ilin, kaj estas ankoraŭ uzataj nuntempe: la kruco laŭ diversaj formoj, precipe la kruco kun rozo en la centro, la svastiko aŭ hokokruco; inter iliaj simboloj ekzistis ankaŭ la cirklo, la triangulo, la kvadrato, la spiralo. Ilia religio, tre pura kaj altnivela, estis esence monoteista, kaj sen superstiĉoj. Oni trovis nenian bildon de idoloj, malsuperaj dioj, nek antropomorfaj figuraĵoj de Dio, t.e. Dio figurita laŭ homaj aspektoj.

La socia vivo estis ideala komunuma reĝimo. Ili ignoris monon. Ĉiu laboris por la komunumo kaj la komunumo prizorgis ĉiun. Egaleco estis perfekta. Estis nek riĉuloj, nek malriĉuloj; do nek sociaj klasoj, nek ebleco de superregado. Oni postulis de ĉiu nur tion, kion li kapablis pro siaj manlaboraj kaj mensaj eblecoj. Ĉiu ricevis ne nur la necesojn, aŭ utilaĵojn, sed ankaŭ ian lukson kaj komforton, iel superan al tiu, kiun ni ricevas, tre malegale, de nia moderna tekniko. La klerigado estis certigita de la komunumo. Ĝi estis tre ĝuste adaptita al la denaskaj kapabloj de la infanoj. Kuracado estis senpaga. Medicino uzis precipe plantojn. Kelkaj kuracoj estis faritaj per psikaj rimedoj, surmeto de la manoj, k.a. Verŝajnas, ke la Lemurianoj posedis ankaŭ gravajn kirurgio-konojn.

Geedzeco estis sankta institucio. Ĝi estis rompebla nur de la morto. Geedziĝo neniam estis perforte trudita de la gepatroj, kaj neniam povis okazi pro socialaj aŭ familiaj kialoj. Ĝi estis protektata de tiaj garantioj, kiaj ebligis, ke la geedziĝo estis reale nerompebla.

La vortoj "riĉeco" kaj "riĉaĵo", laŭ nia kompreno, estis sensignifaj por la Lemurianoj. Ĉiuj necesoj de la vivo estis certigitaj de la socia organizo ekde la unua vivospiro, ĝis la fina transiro. Ili do havis nenian kialon por amasigi riĉaĵojn.

Ili estis nek ĉasistoj, nek militistoj. Iliaj armiloj, pafarkoj kaj sagoj, estis kreitaj nur por sin defendi kontraŭ la gigantaj sovaĝaj bestoj svarmantaj en la vastaj praarbaroj. Milito estis de ili ne konata, eĉ ankaŭ nekomprenebla. Ilia nutraĵo ne estis ekskluzive vegetara. Ili manĝis malgrandajn bestojn kaj fiŝojn. Agrikulturo estis tre progresinta. Ili konis la cerealojn, multajn legomojn kaj fruktojn. Ŝajnas, ke ili ne uzis alkoholon.

La artoj estis tre disvolvigitaj, laŭ tio, kion ni povas dedukti el la eltrovitaj desegnoj, pentraĵoj, gravuritaj ŝtonoj kaj juveloj. Arkitekturo estis mirinda, kaj uzis teknikajn rimedojn tre malsimilajn je la niaj, kaj de ni nekompreneblajn. Atestas pri tio la mirigaj antaŭdiluvaĵoj monumentoj postrestintaj post la kataklismoj: la Granda Piramido de Egiptujo, nomita piramido de Reops, la piramidoj kaj temploj de Sud-Ameriko, la pordo de Tiahuanako, la terasoj de Baalbek, la ciklopa muro trovita en la oceano apud la insuloj Bahamoj, k.a.

(daŭrigota) - Eloi Motillon

LA RUNOJ

La antikvaj nacioj el pragermana gento havis propran skrib- (eble pli ĝuste gravur-) arton, kies literojn oni nomas "runoj". La vorto "runo" komence signifis ĉian kleron, precipe mistikan, sed ĝi ekhavis, poste, pli specialan signifon de "litero". La runaj formoj evidente estas aranĝitaj por oportuna enranĉado en lignon, sed ne estas mirinde, ke plej multo da per runoj subskribitaj objektoj, kiuj restas ĝis nuna tempo, konsistas el malpli perdiĝemaj materialoj.

Oni komune opinias, ke plej malnova runliteraro estis eltrovata en la norda proksimaĵo de Nigra Maro, kie jam tre frue ekzistis orientgermana (gota) regno. Ŝajnas, ke tiu ĉi runaro, kiu havis 24 literojn, mirinde rapide disvastiĝis en landojn loĝitajn de pragermanoj. En Danujo oni trovis objektojn kun runaj gravuroj, kies aĝo estas difinita je la 3-a jarcento. En la 4-a jarcento la biblio estis tradukita en la lingvon de gota nacio vivanta sur Balkana duoninsulo. Restaĵoj el tiu ĉi tradukaĵo, rune skribitaj, estas plej multvalora trezoro de l'libraro de l'sveda universitato en Upsala. En la 6-a jarcento Venantius Fortunatus, episkopo en Poitiers, en Francujo, citas la runojn en versa letero al iu amiko, kiun li admonis skribi "barbarajn runojn sur tabulojn el fraksena ligno", se li ne volos skribi latine. Venantius Fortunatus naskiĝis en norda Italujo, estis edukata en Raveno (tiam regata de l'orientgotoj), kaj li poste vivadis en lokoj de l'nunaj Germanujo kaj Francujo, kaj lia letero do fidinde pruvas, ke la runskribado estis tiam publike konata de l'pragermana loĝantaro de tiuj ĉi landoj.

La runskribado do karakterizis la pragermanajn naciojn. Neniu

el aliaj nacioj uzis ĝin. Kaŭze de l'aliĝo al la kristanismo, la runoj frue estis sur la kontinento anstataŭitaj de la latinaj literoj. En Anglujo ilia uzado estis pli longdaŭra. En la skandinava Nordo la runoj tamen fariĝis plej komune uzataj, kaj tie okazis, ĉirkaŭ la 800-a jarcento, rimarkinda ŝanĝiĝo de la runaj formoj, samtempe kun rapida evolucio de la lingvo. Tiel la malpli frua, speciale skandinava 16-litera runaro estis kreita. Kompreneble estas, ke tiel malgranda nombro da literoj ne ebligis laŭsonan skribadon, sed oni helpis sin por havi du aŭ pli multajn elparolojn per ĉiu el kelkaj literoj.

Dum la tuta Mezepoko la runoj restis kiel skribo de l'popola kulturo, kaj en kelkaj paroĥoj de internlanda arbar-regiono oni, ĝis en la 18-a jarcento uzis la runskribadon. Eĉ en niaj tagoj oni tie povas renkonti homojn, kiuj kapablas sen klera helpo deĉifri la skribon de siaj prapatroj.

Oni trovas sur svedaj memorŝtonoj plej grandan nombro da ĝis nun restintaj antikvaj runskribaĵoj, kaj la provincoj ĉirkaŭ lago Melaren havas la ĉefan parton el tiuj ĉi. Sole la malnova kultur-centro Upland havas proksimume milon da tiaj ŝtonoj, kies plejmulto estis starigata en tiu periodo, kiam la idola kredo cedis kaj kristanismo etendiĝis tien.


La runoj ordinare ne donas al ni sciigojn pri famaj historiaj personoj aŭ okazoj. Sed ili estas des pli gravaj por la kultur-historio. Tre ofte la runoj parolas pri militiroj kaj aventuraj veturoj en malproksimajn landojn. Sur unu ŝtono oni legas: "Toras komisiis starigi tiun ĉi ŝtonon al sia filo Harald, frato de Ingvar. Ili kuraĝe migris malproksimen por oro, kaj oriente ili donis al aglo manĝon; mortis sude en Saracenujo" (Kovrilo paĝo 2-a)

Ankaŭ pacajn veturojn por komercado oni trovas priparolitajn: "Sirid komisiis starigi ŝtonon

al Sven, sia edzo. Li ofte velveturis Sempalon preter Domesnes, per multekosta ŝipo". Tio ĉi evidente koncernas veturojn de komercisto. Sempalo estas parto de Kurlando, kaj la plej norda landpinto inter Baltika maro kaj golfo de Riga estas nomita Domesnes. Iam estas dirite, ke tiuj viroj, por kies memoro la runoj estas gravuritaj, migris orienten, sed iam estas pli precize dirite, ke Rusujo (Gardarike) aŭ Novgorod (Holmgord) estis celo de la veturoj. Ankaŭ Anglujo kaj eĉ Grekujo estas ofte nomitaj. La veturoj al Grekujo certe plej ofte celis militistan servon en gardistaro de l'imperiestro en Konstantinopolo. Pri Ragnvald, viro el provinco Upland, runoj sciigas, ke li estis estro de la nomita gardistaro.

La cirkonstanco, ke virinoj ofte estas nomitaj sur la runaj ŝtonoj, atestas la estimatan rangon, kiun havis en Skandinavujo la virinoj. Sur ŝtono antaŭ ne longe trovita oni legas: "Siba starigis ŝtonon pri sia edzino Rodĉaŭd; ŝi mortis juna for de malgrandaj infanoj". Lingvosciencisto, kiu konatigis tiun ĉi enskribaĵon, skribis pri ĝi: "La enskribo estas kortuŝanta spite sia simpleco. El la sveda literaturo mi ne konas pli malnovan ateston pri la zorgo de vidvo por siaj senpatrinaj infanoj."

Kiel jam estas dirite, granda nombro da runskribaĵoj devenas de tiu tempo, kiam la krista kredo etendiĝis. Ofta finaĵo: "Dio helpu (ŝ)(l)ian animon" atestas tion. Pli ol cento da ŝtonoj rakontas pri personoj, kiuj por savi sian animon konstruis vojojn, pontojn aŭ rifuĝejojn. Ĉe Tebi, norde de Stokholmo, oni trovas tian "ponton", vojon trans marĉo, kun vicoj da ŝtonoj laŭlonge de la flankoj. Sur iu el tiuj ĉi ŝtonoj oni legas: "Jartabanke starigis la jenajn ŝtonojn pri si mem, dum li vivis, kaj konstruis por sia animo tiun ĉi ponton, kaj li sole posedis tutan Tebi; Dio helpu lian animon". (Vidu la postan kliŝon).



Täby, paroĥo Vallentuna, Upland.

Fama skulptaĵo sur ŝtonego en provinco Sudermanland montras scenojn el antikva legendo de Sigurd Favnisbane, kaj havas la jenan enskribaĵon: "Sirdi patrino de Alrik kaj filino de Orm, faris tiun ĉi ponton por la animo de sia edzo Holmger; li estis patro de Sigred".

La lingvo de l'runaj ŝtonoj estas simpla kiel la ŝtonoj mem. Sed tamen, kiom da homaj sentoj estas esprimitaj tie. Ĉu ne estas vera romantiko en la miljara konfeso: "Filino de Anund estas mia ĝojo; ŝi sidas apud la brodstablo".

Alia ŝtono rakontas al ni: "Iskurun, filino de Had, skulptigis pri si mem tiujn ĉi runojn. Ŝi volas migri orienten ĝis Jerusalemo." Kiu ajn povas laŭplaĉe imagi al si plenigon de tiu legendo, kies fragmenton oni tie ĉi legas. Kiu estis ŝi, kaj kial ŝi sopiris foriri? Ni scias nenion pri tio.

Originale verkis John Lundgren

Kunkuŝe kun du reĝinoj (1)

Estis ofte raportate pri reĝaj amoraventuroj; pri reĝinaj multe malpli. Ĉu pro manko de spicaj okazintaĵoj? Certe ne - la malon pruvos la ĉi-subaj ekzemploj kaj aliaj indus enviciĝi...

Ho ve! La rafinita antaŭnomo Izabela estas propraĵo de tiuj du senhontulinoj.

Izabela, reĝino de Anglujo-

Sian malfeliĉon propramane teksas Johano la senbienuko (jam perversa nigr-animulo), kiam li neatendite forrabas el ŝia fianĉo Izabelan el Angoulême por fari el ŝi ĵaluze gardatan edzinon. Je li ŝi ja indos, eĉ lin majstre kapablos superi.

La 27-an de majo 1199 Johano surtroniĝas post la tro frua morto de sia frato Rikardo (la kromnomata "Leonkorulo"), malbonŝance sagotrafita. Stranga afero tamen, ĉar je logika vidpunkto devus reĝadi la filo de la mortinto, Arturo de Bretonujo.

Aŭtunon kaj vintron la novkronito pasigas en Akvitanujo; al la palato de tiu manĝ-amanto tre plaĉas la regionaj gustumindaĵoj kaj bordozaj vinoj. Ĝoje komenciĝas por li la 13-a jarcento kaj li decidas survojiĝi al Angoulême por partopreni en pompa festo aranĝota de tutpotenca vasalo. Sian dezirindan filinon Izabela ĉi lasta estas edzinigonta al Hugo el Lusignan, kies familia nomo jam famiĝis en Jerusalemo. Por elmontri, kia favorkora feŭdestro li estas, la reĝo jam promesis, ke li persone alkondukos la fianĉinon al la sankta altaro. El ĉiuj la plej bela, tiu verdokula 15-jarulino (ŝian belecon atestos kuŝostatuo en abatejo Fontevrault), sed, ho ve! diable orgojla... Ĉiujn ŝiajn postulojn respondas Hugo, belaspekta kaj riĉo-hava altnobelo. Sed kruelan vundon Izabela estas antaŭ nelonge suferinta tial, ke la "Leonkorulo"

estis devigita subiĝi je Filipino-Aŭgusto, reĝo de Francujo. Ĉi-okaze ŝi kaj tuta familio estas travivintaj la mordan honton de malvenko.

La 33-jaraĝa Johano tute ne similas Rikardon. Liaj graseta korpo kaj oblikva rigardo iel pensigas pri kato. Sed tio ne malhelpas, ke kronita kapo nepre allogas... Des pli, ke la kronito ĵus eksigis sian edzinon.

En la solena momento, kiam la fianĉino estas eldironta la porvivan "jes"-vorton, Johano ordonas al la mirkonsternita episkopo, ke li tujtuj edzinigu Izabelan ne al Hugo, sed al la reĝa moŝto mem. Surprizita Izabela ne longe ŝanceliĝas kaj konsentas. Al indignita patro la nova edzo senhonte rebatas, ke vasalo devus senti sin ege honorigita pro tia elekto fare de feŭdomastro. Kaj la novedzino siaflanke, ne malkontenta, hipokrite konsilas obeemon al la patro kaj submetiĝon al la eksfianĉo.

Johano fulmrapide iras sian vojon tra mirigita popolamaso kaj forgalopas el Angoulême kun Izabela postsele disskuata.

Senfina la mielotempo en Normandujo kaj Anglujo... Tagojn post noktoj la nesatigebla Johano enfermas troamatan edzinon, kiu ĝuas paŭzetojn nur, kiam la elĉerpita amordonanto sidas ĉetable por reakiri fortojn; tiagrade, ke dum oktobro, kiam ŝi ricevas la reĝinan kronon, ŝi jam sopiras je emancipado kaj libereco. Sed kiel fortiriĝi el malsincera senenergia kruelulo tirane kondukanta?

Jen la ofendegita Hugo apelacias al la reĝo de Francujo, feŭdomastro de sia rivalo koncerne la normandan dukejon. Spite la minacordonon, ke li senprokraste aperu, spite la riproĉadmonojn de Izabela, Johano surdas. Tamen plaĉus al ŝi, ke venkanta edzo enpaŝu la civitan palacon en Parizo, kio forviŝus la iam suferitan honorvundon. Sed Johano prefere fidus je la tempo-fluo. Rean fojon minacordonon sonas pro la murdo de la nevo Arturo. Rean

fojon Johano surdas kaj, kompreneble, estas senigita je siaj posedaĵoj en Normandujo (1204), precipe je la nekaptebla fortreso, Château-Gaillard laŭnome, ameme konstruita de la Leonkorulo. Tondras Izabela, kiu, por puni la malkuraĝulon, ŝlosfermas sian dormoĉambran pordon. Tiom premas la danĝero, ke ŝia bopatrino Eleonora baldaŭ mortos pro ĉagreno kaj reatingos la filon Rikardo sub la Fontevrault-volboj.

Izabela antaŭavertas, ke ŝi sin mortigos, se la edzo provos perforti la malpermesitan pordon. Kaj jen dum inke nigra nokto ŝi foriĝas el la palaco kaj enŝipiĝas en direkto al la franca marbordo. Ŝi iras al la patro kaj sentas sin tute libera en Angoulême. Nun ŝi pli belas ol iam antaŭe. Du infanojn ŝi naskis, kio ĉarme modlis ŝian korpon. Ŝi malkovras, kiom plezur-instiga estas malfideleco. Kiam Johano venas Bordozone por rehavigi al si forvaporigitan edzinon, nur du semajnojn ŝi lin atendigas, ĉar finfine priatentinda estas reĝina krono, ĉu ne? Al ŝi li etendas larĝe malfermitajn brakojn kaj petas pardonon tial, ke li ŝin seniluziigis. Grandanima Izabela ne domaĝas siajn pardonvortojn kaj enlasas la kortuŝan pentanton.

Ili revenas Anglujon. Tie la dancon kondukas ŝi. Ŝi jam ne plu toleras enfermiĝon, eĉ daŭrigas la plezurinstigajn spertojn ekĝuintajn en Angoulême. En ŝian ĉambron Johano estas enlasita nur kiam tiel plaĉas al ŝi. Cetere li submetiĝas, ĉar li ja scias, ke en mala okazo ŝi denove forvaporigos. Iun vesperon tamen, Izabela ekvidas la superlite balanciĝantan kadavron de ŝia amordonanto Coventry. La aferon aludas nek li, nek ŝi. Simile okazas kun trobadoro el Akvitanio, poste kun tria rolulo. Nek riproĉas Johano, nek plendas Izabela, kiu trian idon naskas.


Kaj fluadas la tempo. En 1213 Johano estas defaligita kaj ekskomunikita de la papo; unu jaron poste

la ribelantaj baronoj postulas la Grandan Ĉarton. Tamen ĉio ĉi tio ne pelas lin al pli laŭhonora kondutmaniero kaj pli kaj pli humiligita Izabela lin abomenas. La papo sendas la reĝon de Francujo, por ke li forprenu la kronon de la malinda reĝa kapo. Sed la malinda fiulo fuĝas for kun la edzino en kulmino de furiozo. Denove la dormoĉambra pordo fermiĝas antaŭ la edza nazo, sed ne antaŭ portempaj amordonantoj. Ĉu imageblas, ke franca reĝo surkapigu la reĝan kronon, dum ja idojn naskis ŝi, kiujn la popolo certe agnoskus, se pereus la senhonta patro? Tial la 17-a de oktobro 1216, frandinte persikokompoton en cidro kaj vino marinitan, la jam tro longe vivinta manĝamanto subfalas al mortiga laksego. La kronon ricevas la pliaĝa filo, kaj Izabela, neŝatata en Anglujo, revenas al Angoulême. Intertempe vidviĝis Hugo el Lusignan. Tri jarojn do post la morto de Johano, Izabela edziniĝis je li. Sed je reĝino li edziĝas, ĉar ekster la lito li nur ĝuas statuton de privilegia subulo!

En 1241 ŝi instigas Hugon rifuzi la omaĝon ŝuldatan al la nuna grafo de Potevio kaj Aŭvernjo: Alfonso, propra frato de Ludoviko la 9-a. Post venko de la edzo ŝi senkomplete lin forpelas kaj teksas planon por veneni la reĝon mem. Sed la plano fiaskas kaj ŝi estas devigata petegi pardonon, kiun tre favorkora reĝo senhezite donas.

Ĉu nun la plej bona solvo ne estus libervola enklostriĝo? Logika elekto ŝin tiras al Fontevrault, kie, tri jarojn poste, iu verdokulino redonos al Dio tre nigritan animon.

S. BONIOL



La kontraŭpesta muro

En la jaro 1720, ŝipo venanta el orienta lando kunportis al Marsejlo peston. La malsano mortigis preskaŭ la duonon de la loĝantaro de la urbo: sesdek mil homojn. Kiel sinistra tajdo ĝi etendiĝis iom post iom ĝis Provenco. Ĉar ili timis, ke la plago infektos ankaŭ la Comtat Venaissin (*) la instancoj de Langvedoko kaj Daŭfenlando malpermesis interŝanĝojn de varoj kaj homoj kun Provenco.

Tiam la loĝantoj de Comtat, konsiderante sin sanaj, organizis, en februaro 1721, kunvenon de la regionaj instancoj de la franca Reĝlando kaj de la papaj Teritorioj. Estis decidite duobligi la jam ekzistantajn sanitarajn kordonojn per fortika muro apartiganta materie la malsanan Provencan de la ankoraŭ sana Comtat.

La loĝantoj de la montaraj vilaĝoj, precipe tiuj de Venasque kaj Methanis, konstruis sur la supro de la montoj dek mil klaftojn ^(**) longan muron sesfutojn altan el senjuntaj ŝtonoj. Sur la malaltaj ebenaj terenoj la muro estis anstataŭigita de sesfutojn larĝa kaj sesfutojn profunda fosaĵo. Kvincent rekviziciitaj kaj malbone pagitaj viroj laboris tie de marto ĝis la fino de junio 1721. Laŭlonge de tiu muro estis konstruitaj iom pli ol tridek gardostaraj budoj kaj cento da ŝtonkonstruaĵoj kiel ŝirmejoj por la gardantaro. Parto de la soldatoj loĝis en la vilaĝoj aŭ en farmdomoj. La aliaj loĝis en la "bories" (***) jam ekzistantaj aŭ tiam konstruataj.

Ĉu tiu muro efikis? Malpli ol oni tiam esperis sed pli ol oni imagas. Avignon, Orange, Cavailon estis infektitaj sed ne la montaraj vilaĝoj; la pesto eniris nek Venasque, nek Methanis. Ĉu dank'al la muro? Ĉu dank'al la preĝoj, pilgrimoj kaj alpreĝoj al la Virgulino kaj al la diversaj, multnombraj regionaj sanktuloj?


De tiam la vegetaĵoj invadis la muron; homoj forprenis ŝtonojn por konstrui siajn proprajn domojn. Sed en 1987 kelkaj propravaluloj fondis asocion por trovi la tutan linion de la muro kaj liberigi ĝin el la vegetaĵaro. Jam liberiĝis 5-kilometra voĵeto por promenado laŭlonge de la muro.

(el dokumentoj de la Turismoficejo de Venasque, F-84670)

Klarigoj: (*) Comtat Venaissin estis teritorio inter Langvedoko, Daŭfenlando kaj Provenco, kiu apartenis al la Papo ĝis 1791, kiam ĝi fariĝis granda parto de la franca departemento Vaucluse.

(**) Malnova mezurunuo de longo aŭ de profundo; la franca klafto estis 1,95 m. longa.

(***) la "bories" estas malgrandaj konstruaĵoj el senjuntaj ŝtonoj, kupolaspektaj, izolitaj aŭ grupaj. Oni diras ke kelkaj ekzistis jam dum la galla epoko. Ili nun utilas, kiel ŝirmejoj.



La Mireginda tekruĉo.

JAPANA FABELO.

Antaŭ longe, tre longe, en la templo de Morinji, en la provinco Kotsuke, vivis maljuna pastro. Tiu maljuna pastro tre ŝatis la ceremonion por prepari kaj trinki la teon faman, kiel tiu de Chanoyu; vere, direkti tiun ceremonion estis lia plej granda plezuro.

Iun tagon li havis la ŝancon trovi en la butikoj de revendisto tre belan malnovan tekruĉon, kiun li aĉetis kaj kunportis hejmen, tute ĝoja pro ĝia bela formo kaj arteca aspekto. La morgaŭan tagon li ekzamenis sian novan akiraĵon kaj longatempe sidadis turnante ĝin ĉiufanken kaj ĝin admirante.

"Vi estas regula belulo, vere vi estas tia", li diris, "mi invitos miajn amikojn por la Chanoyu; kaj kiom ili miros, vidante tiel belegan tekruĉon, kiel vi estas!"

Li metis sian trezoron sur la kovrilon de kesto, kie li povos pli facile rigardi ĝin, kaj sidante, admirante ĝin; kaj li projektis, kiom da gastoj li invitos. Post nelonge li ekdormetis kaj komencis balanci sian kapon, kiu fine falis antaŭen, sur la tablon. Tiam okazis mireginda aliformiĝo. La tekruĉo komencis movi sin: ĉe la beko aperis harhava kapo, ĉe la kontraŭa flanko montriĝis bela vila vosto, post nelonge kvar piedoj montriĝis; samtempe bela felo ŝajnis laŭgrade tegi la supraĵon de la tekruĉo. Fine, saltante de la kesto ĝi komencis danci tra la ĉambro, simila al melo.

Tri junaj lernantoj, kiuj studadis en la apuda ĉambro, aŭdis bruon, kaj kiam unu el ili rigardis tra la glitpordo, kiom multe li miris vidante la tekruĉon kun kvar piedoj, kiu dancas tien ĉi kaj tien en la ĉambro. Tiam li ekkriis: "Ho! kiom terura estas tia afero! La tekruĉo fariĝis melo!". "Kio?" diris la dua lernanto, "ĉu vi pensas, ke la tekruĉo fariĝis melo? Kia malsprit-



aĵo!" Tion dirante, li puŝis sian kunulon aliflanken sed li ankaŭ ekrigardinte ĝin, tre miregis pro tio, kion li vidas, kaj akre ekkriis: "Ĝi estas fantomo, ĝi venas al mi; ni foriru!" La tria lernanto ne estis tiel facile timigebla. "Nu, tio estas plivole ŝercaĵo" li diris; "kiel tiu estaĵo saltas ĉu vi estas certa? Mi vekos la majstron kaj li vidos".

Tiam li eniris la ĉambron kaj skuis la majstron ekkriante: "Vekiĝu! majstro, vekigu! okazas stranga afero."- "Kio estas?" diris la maljunulo, dormeme frotante siajn okulojn, "kia bruegulo vi estas!"- "Ĉiuj estus bruemaj, kiam okazas tiel strangaj aferoj, kiel tiu ĉi. Nur rigardu, majstro, via tekruĉo havas piedojn kaj ĝi kuras tien ĉi kaj tien!" - "Kion! kion! vi diras?" demandis denove la pastro, "la tekruĉo havas piedojn! Kio estas tio? Mi rigardu!" Sed dum tiu tempo, kiam la pastro tute vekigis, la tekruĉo estis repreninta sian ordinaran formon, kaj kuŝis kviete denove sur la kesto. "Kiel frenezaj vi estas, junuloj!" diris la pastro, "la tekruĉo kuŝas sur la kovrilo de la kesto; certe nenio estas stranga en tio! Ne, ne; mi aŭdis pri rulilo de kukaĵisto, je kiu kreskis du flugiloj kaj kiu forflugis; sed de la tempo, kiam mi vivas, neniam mi aŭdis pri tekruĉo, kiu dancis sur siaj propraj piedoj! neniam vi tion kredigos al mi."

Sed pro ĉio tio la pastro estis en iom malkvieta spiritstato, kaj pensis pri tiu okazintaĵo la tutan

tagon. Kiam alvenis la vespero kaj kiam li estis sola en sia ĉambro, li prenis la tekruĉon, plenigis ĝin je akvo, kaj metis ĝin sur fajran karbon por boligi la akvon, intencante fari teon. Sed tuj kiam la akvo ekbolis: "Estas varme! estas varme!" ekkriis la tekruĉo kaj ĝi saltis de la fajro. "Helpon al mi! helpon!" ekkriis la pastro timigita kaj duon-freneza. Sed kiam la lernantoj alvenis por helpi, le tekruĉo estis repreninta sian naturan formon; tiam unu el ili, preninte bastoneton, ekkriis: "Ni baldaŭ ekscios ĉu ĝi estas viva aŭ ne!" kaj li komencis bati ĝin kiel eble plej forte. Certe ne estas vivo en tiu afero, nur metala resonado! resonado! Tiam la maljuna pastro tre bedaŭris estis aĉetinta tiun malican tekruĉon, kaj li pripensis, kiamaniere li povos senigi sin je ĝi. Li pensis, ke nur la kaldronisto povas tion fari. La kontrakto estis post nelonge interkonsentita: la kaldronisto aĉetis la tekruĉon por malmultaj kupraj moneroj kaj kunportis ĝin hejmen. Antaŭ ol kuŝiĝi li rigardis ĝin ankoraŭ kaj trovis ĝin pli bela ol la unuan fojon. Tiam li kuŝiĝis por dormi.

Meze de agrabla sonĝo subite la kaldronisto leviĝis, kredante, ke li aŭdas iun, kiu moviĝas en la ĉambro, sed malferminte la okulojn, li vidis neniun. "Tio estis nur sonĝo, mi supozas", li diris en si mem kaj li ekdormis denove. Sed, denove, li estis interrompita de iu, kiu alvokis: "Kaldronisto! kaldronisto! Leviĝu!" Ĉi foje li elsaltis tute vekite, kaj tiam li vidis la tekruĉon kun kapo, vosto, piedoj, haraĵo kiel melo, kiu fiere marŝis tien ĉi kaj tien en la ĉambro.

"Fantomo! fantomo!" ekkriis la kaldronisto. Sed la tekruĉo ekridis kaj diris: "Ne estu do timigita, mia kara kaldronisto; mi ne estas fantomo sed nur tekruĉo. Mia nomo estas Bumbuku-Chagama, kaj mi alportos la feliĉon al tiu, kiu bone agos kun mi, sed, nepre, mi ne ŝatas, kiam oni metas min sur la fajron, kaj kiam oni batas min per bastonetoj, kiel tio okazis en la templo hieraŭ."

"Kiel mi povos plaĉi al vi?" demandis la kaldronisto, "ĉu mi devos loki vin en keston?" - "Ho ne, ne!" respondis la tekruĉo, "mi ŝatas bongustajn manĝaĵojn kaj kelkfoje iom da vino por trinki ĝuste kiel vi. Ĉu vi volas konservi min en via domo, kaj nutri min? Kaj tial ke mi ne volas esti ŝarĝo por vi, mi laboros laŭ ia maniero, kiu plaĉos al vi". Tion akceptis la kaldronisto.

La morgaŭan matenon li preparis grandan festenon por Bumbuku, kiu tiam tiel parolis: "Mi estas nepre mireginda kaj perfekta tekruĉo kaj mi konsilas al vi kunporti min kun vi tra la lando, kiel kuriozan vidaĵon kaj montri min kun kantoj kaj muziko. La kaldronisto, opiniinte, ke tiu avizo estas bona, aranĝis montrejon, kiun li nomis La Bumbuku-Chagama.

Tuj la afero de la tekruĉo ricevis grandan sukceson, ĉar ne sole ĝi dancis per siaj kvar piedoj sed marŝis sur streĉita ŝnuro, kaj plenumis multe da ekvilibraĵoj, kaj finis profunde reverencante al la spektantaro kaj petante ĝian helpon. La famo de tiuj lertaj agoj post nelonge disvastiĝis kaj la teatro ĉiutage pleniĝis, ĝis fine eĉ la Princoj el la lando ordonis al la kaldronisto, ke li kunportu sian tekruĉon al ili, kaj tiu vidaĵo ĝojigis la princinojn kaj la sinjorinojn de la kortego.

Fine la kaldronisto trovis sin sufiĉe riĉa kaj li forlasis la negocon, kaj dezirante, ke lia fidela tekruĉo ripozu, li alportis ĝin kun granda parto de siaj riĉaĵoj al la templo de Morinji, kie oni konsideras ĝin, kiel multe valoran trezoron kaj, oni diras, eĉ kiel sanktulon!

Traduko de Dro Gambier

aperinta en "Internacia Literaturo"

REYKJAVIK

ANTAŬ UNU JARCENTO

(Tiu artikolo estas eltiraĵo el la romano de Jules Verne: "Vojaĝo en la Tero-centron". Tiam Islando estis Dana. Ĝi fariĝis sendependa nur en 1944.)

La urbo etendiĝas sur tereno iom malalta kaj marĉa inter du montetoj. Granda lafofluo kovras ĝin sur unu flanko kaj malsupreniras laŭ malkrutaj deklivoj ĝis la maro. Sur la alia flanko etendiĝas la vasta golfeto Faksa, norde limigata de la grandega glaciejo de monto Sneffels. En tiu golfeto nur Valkirio tiam (Valkirio estis la nomo de la ŝipo de la esploristoj). Kutime la anglaj kaj francaj fiŝgardaj ŝipoj ankriĝas en plena maro, sed tiam, ili deĵoris ĉe la orientaj bordoj de la insulo.

La pli longa el la du stratoj de Rejkjavik estas paralela je la marbordo; tie loĝas la vendistoj kaj negocistoj en lignaj kabanaj konstruitaj el ruĝaj traboj horizontale surmetitaj. La alia strato situanta pli okcidente aliras al laĝeto inter la domoj de la episkopo kaj de aliaj nekomercantaj personoj. Post mallonga tempo mi estis trapasinta tiujn malĝojigajn, malgajajn domojn. Foje mi ekvidis pecon de razeno, senkolora, kiel malnova lantapiŝo frote eluzita, aŭ ian ŝajnon de arboĝardeno, kies malmultaj legomoj, brasikoj kaj laktukoj estus neĝenataj sur liliputa tablo. Ankaŭ kelkaj malsanaj keirantoj provis spiri etan sunan aeron.

Proksimume je la mezo de la nekomerca strato, mi trovis la publikan tombejon, kiu estis ĉirkaŭbarita de tera muro. Post kelkaj paŝoj mi alvenis al la domo de la guberniestro, nura domaĉo kompare kun la urbodomo de Hamburgo, palaco kompare kun la kabanaj de la islanda loĝantaro.

Inter la laĝeto kaj la urbo staris la preĝejo konstruita laŭ la protestanta stilo el kalcinitaj ŝtonoj elĵetitaj de la vulkanoj mem. Kiam blovis la okcidentaj ventegoj, la ruĝaj tegoloj evidente disflugis en la aeron, ege domaĝante la kultantojn. Sur najbara elstaraĵo mi ekvidis la Nacian Lernejon. Poste mi estis informata de nia gastiganto, ke oni instruas en ĝi la hebrean, anglan, francan kaj danan lingvojn, de kiuj eĉ ne unu vorton mi konis. Mi estus la lasta el la kvardek lernantoj de tiu kolegio, kaj estus malinda kuŝi kun ili en iliaj dufakaj ĉambroj, kie delikatuloj sufokus ekde la unua nokto.

Post tri horoj mi estis vizitinta ankaŭ la ĉirkaŭaĵon. La ĝenerala aspekto estis strange malgaja. Ĉie la akraj eĝoj de la vulkanaj rokoj. La kabanaj de la Islandanoj estas faritaj el tero kaj torfo. La tegmentoj ŝajnas esti lokitaj sur la tereno. Tiuj tegmentoj estas relative fekundaj herbejoj kaj oni zorge prifalĉas ilin dum la fojnsezono, ĉar la bestoj venus pastiĝi sur tiuj verdantaj loĝejoj.




POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

Trovotaj vortoj: Kristnasko- subvencio-
arkipelago- horizontala- vazelino-
nikotino- najtingalo- elefanto-
esperantisto- supkulero-fuliko-vivisekcio

Trovota frazo: La plej necesa afero, kiun
ni en la vivo bezonas, estas havi iun, kiu
zorgas, ke ni faru tion, kion ni povas.

NOVA ENIGMO



Horizontale: 1- Orienta kvarpiedulo. 4- Orienteŭropa lando. 7- Sciigo. 8- Mitologia marmonstro. 10- Politika mondorganizaĵo. 11- Safa haro. 12- Nomo de monato. 14- Leda piedvesto. 15- Altvalora metalo. 17- Malplori. 19- Subtera ĉambro. 21- Duonĉevalo. 22- Altvalora ludkarto. 24- Kunĝluilo de brikoj. 26- Besta manĝujo. 27- Norditala urbego. 28- Batalo de mortanto.

Vertikale: 2- Antaŭkristnaska tempo. 3- Malfraŭlo. 4- Mezeŭropa ĉefurbo. 5- Preni ĉambron por uzo. 6- Abrahamidoj. 9- Malpurega kvarpieduleto. 12- Akvego. 13- Sudeŭropa ĉefurbo. 16- Nordeŭropa ĉefurbo. 18- Fari bildon kraĵone. 20- Manĝebla riverfiŝo. 21- Vivĉeso. 23- Maleleganta kvarpiedulo. 25- Sankta nombro.

LA VIVO EN GRESILLON

Impresoj pri mia restado en Gresillon

aŭgusto 91

Mi bonŝancas loĝi sufiĉe proksime al nia kulturdomo kaj tre ofte vizitas ĝin de kiam mi malkovris ĝin unuafoje en 1965. Kiom da ŝanĝoj, da plibonigoj kaj plibeligoj! Dum tiu staĝo, la ŝanĝoj ne estas tre okulfrapaj; ili estas pli teknikaj. Nun estas tute nature trovi tualetejon en ĉiu ĉambro kaj komforton. Grezijon fariĝas kvazaŭ hotelo. Eble oni povas iom bedaŭri tion ĉar la esperantistoj malpli partoprenas en la diversaj aranĝoj. La ĉefa aktivaĵo estas la kursoj. Kvankam ĉiu persono, kiu aliĝas al studperiodo en la Kulturdomo scias pri la kursoj, kiam, la unuan tagon, oni listigas la lernantojn, la nombro da kursanoj ne egalas la nombron de la ĉeestantoj. Okazas eĉ, ke ĝi ŝanĝiĝas dum la staĝo. La bona flanko de tiu konstato estas, ke tro granda nombro da lernantoj malfaciligus la instruadon, la lernadon kaj la personajn rilatojn en la kursoj mem. Pli kaj pli instruas eksterlandaj kompetentuloj, kiuj instruas laŭ malsimilaj metodoj kaj kriterioj. Por la lernantaro tio estas riĉiga sperto. Mi bedaŭris, ke en nia kurso, ĉi foje, ne ĉeestis japanoj. Mi ŝatas diskuti, argumenti kun azianoj, kies kulturo kaj edukado tiom malsamas. Plie, ju pli da eksterlandaj ĉeestantoj des malpli da emo "krokodili". Por mi la ĉefa, preskaŭ nura leĝo en Grezijon estu: "Uzu Esperanton, ĉefe kiam en rondo ĉeestas eksterlandanoj. Pro ĝentilece. Oni tamen devas konsideri la komencantojn kaj ne tro tedi ilin.

Oni ankaŭ devas konsideri, ke estas feritempo. Mi opinias, ke plej ofte la kursgvidantoj taŭge kaptis tiun etoson. Ili instruis serioze, kompetente sed ne tiel rigore, kiel dum lerneja tempo dum tuta jaro. Por multaj la kurso estis pli intelekta ludo ol vera laboro. En la kastelo oni lernas ne nur dum kursoj sed dum la tuta tago. Ne nur la lingvon sed ankaŭ diversajn aferojn, kiel la japanan kuracan arton, la gravecon de la pastoj en la itala manĝkutimo, ankaŭ, kompreneble, pri la esperanto-movado en la mondo.

Por mi la plej grava intereso, ĉefa kialo de miaj oftaj restadoj en la kastelo estas retrovi malnovajn amikojn kaj kontakti novajn. Ĉiu staĝo havas sian propran etoson. Mi bedaŭras, ke de kelkaj jaroj ne plu okazas la manaktivaĵoj dum la posttagmezo. Mi pensas pri restarigo de la korbofarado kiu tiel bone sukcesis. Eble, se vi revenos venontjare mi helpos vin fari belajojn el rotango. Oni bone interkonatiĝas dum tiuj komunaj laboroj. Grezijon estas ideala loko ankaŭ por longaj konversacioj en la ombro de belaj arboj. Mi bedaŭras, ke mi ne estas sufiĉe kompetenta por helpi en ĝia vivo.

Juanita

LIBRO - SERVO

Nia Libro-Servo proponas al vi ĉiujn ankoraŭ haveblajn librojn: lernolibrojn, vortarojn, lingvistikajn, sciencajn, teknikajn librojn, romanojn.... Nur petu la katalogon:

J. Vincent, 26 bis rue de Milngavie, F-49150 Baugé

Niaj perkorespondaj kursoj

Por komencantoj: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Por praktikantoj: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkigoj, taskoj sendotaj por korektado.

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Supera kurso: de- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri KApableco.

Prezo de la kurso: 150 f.f.





Mi pagis mian abonon
ĝustatempe.
Kaj vi?

al P. Babin, poŝtkonto Nantes 281361L
aŭ al via peranto: vidu liston sur la
lasta kovrilpaĝo

NIA KONKURSO

GRAMATIKO PER BONHUMORO

La objekta komplemento : ĝi estas la persono aŭ la aĵo, kiun la ago atingas :
« Mi manĝas panon — ni parolas pri amikoj ».

La rekta objekta komplemento : sen prepozicio ; signita de akuzativo :
« Mi faras vojaĝon — mi renkontis mian kuzon ».

Nerekta objekta komplemento : kun prepozicio, sen akuzativo :
« Mi kantas kun vi — rakontos pri tiu akcidento ».

Grave : pro sia rolo « SIA » akompanas komplementon, neniam subjekton :
« la lernanto prenas siajn librojn ; liaj libroj estas novaj ».

CERBUMU !


Ĉiu teksto sub la bildoj entenas UNU aŭ plurajn erarojn. La korektitaj tekstoj aperos en la venonta numero de la revuo.

Kial ?... ĉar...



Paĉjo, kial ci ne volas, ke mi havu longaj harojn kun florojn sur la kapo? ĉu ĉar ci estas tuta kalva sub ĉia peruko?

Por efika helpado



Panjo, jam de preskaŭ unu horo, paĉjo estas el la ĝardenon por ripari la gazontondilo; ĉu mi povas iri kun lin por lin helpi?

Klarigita problemo



Mi ne komprenas kial vi faras tiom da demandojn; ĉu vi nenio scias? ĉu mi devas cer-

bumi dum la tuta vespero super la libroj por al vi scioj alporti?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboã.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34